Grup
d'Esperanto
JOZEFO ANGLÈS
de Sant Cugat del Vallès

# LA HELA HIRUNDO

## BULTENO ESPERANTA GRUPO

Ateneu Santcugatenc - Pl. Pep Ventura 1 - Sant Cugat del Vallès

Nº 10 JULIO

# LA LINGVO DE LA HOMARO

BULTENO DE LA ESPERANTA
GRUPO "Jozefo Anglés"

Nia adreso:
Grup d'Esperanto 'Jozefo anglés'
Pl. Pep Ventura - 1 - C. 08190
aû Poŝ'kesto. 336 t. 674 61 80

Prezidantino:
TRINITAT GARCIA

Vicprezidanto:
JOAN SUTRIAS

Sekretario:
JOSE MANUEL CONDE

Vicsekretario:
ADAMO SANCHEZ

Kasisto:
JOSEP CASTAÑE

Gekunlaborantoj:
ALICIA SMITH
GLORIA CORRONS
KARLO ANGLES
JAUME DELTELL

**ENHAVO**

5o- a Hispana EsperantaKongreso
Andaluzia Esperanto- Unuiĝo (A.E.U.)
Fr. Letero, Federico Mayor Zaragoza.
Ridetu Iomete.
Amikarejo.
La Kursoj.
Esperanto.
Esperanto kaj rizo sub la Pin-
arbaro.

PRI LA ENHAVO DE LA ARTIKOLOJ
RESPONDECAS LA AUTOROJ MEM.

# Proksimiĝas la Jubilea 50 - a Hispana Esperanta Kongreso en Sant Cugat del Vallès.

Gesamideanoj, kiam vi legos tiun ĉi Bultenon la KOGRESO jam estos malfermita.

Bedaŭrinde la monato de Julio ne estas tre agrabla por vojaĝi, sed la Kongresejo ne estas varma kaj mi pensas, post la fino de Kongreso vi estos kontentaj, almenaŭ tion klopodos fari kaj esperas sukcesi en tiu tasko.

Jam antaŭe okazis du aliaj Kongresoj: Unue la 21 Kataluna Esperanta Asocio K.A.E., kiu tre bone sukcesis, poste S.A.T. Sennacieca Asocio Tudmonda estis la 59 - a Internacia, ankaŭ sukcesis tre ĉar, kvankam ni ricevis multe da helpo de la kamaradoj el Barcelono, Sabadell, Terrassa, Esperantaj Fervojistoj k.t.p. pro la malproksimeco de ili,jen en nia laboro mankis kohereco.

Tamen mi pensas ke Esperanto meritas niajn volon kaj klopodojn ĝis kiam la liĝvo estos instruita en lernejoj.

Ĉi tie, en nia Lando, dum la Respubliko jam estis akceptita de la registaro instrui Esperanton en lernejoj, sed bedaŭrinde alvenis nia civil - milito kaj ĉio kio estis floranta malaperis.

Por Esperanto nun estas oportuna momento; optimismo kreskas. Ĉiu tage en Sant Cugat, ni estas optimistoj. Kiam okazas kunvenoj en la Urbodomo de la kulturaj asocioj, kaj kiam estas festoj aŭ inaŭguroj nia Grupo JOZEFO ANGLES estas invitata, ĉar ni havas statuton kaj ĉion en ordo. Mi esperas ke nia Grupo ne fiaskos, nek malaperos; la GRUPO daŭrigos laborante kun entuziasmo kaj kuraĝo.

Mi nur bedaŭras (kaj multe) ke ĉiuj la Geesperantistoj ne estas pli koheraj, kiel bela bukedo.

Mi petas,UNUIĜU! ĉiuj por plifortigi nian MOVADON!.

LUMO

# ANDALUZIA ESPERANTO - UNUIĜO (A. E. U.)

ASOCIACION ANDALUZA DE ESPERANTO

---

O F E R T A S   A L   V I :

---

* La Diskon LP (longadaŭro) KOSMO-INFANO de la malaga muzikisto SOLO, kun modernaj kaj belaj kanzonoj en esperanto. Surdiskigita per nova digitala sono-sistemo DAT, kiu ebligas la plej bonan sonon.

Prezo: 1.200,- ptoj. (Disko + teksto + sendo)

* La Libron PANDEMONIO, verkitan de junaj hispanaj verkistoj, kun riĉaj literaturaĵoj premiitaj ĉe la Belartaj Konkursoj de UEA.
Rakontoj de Georgo Kamaĉo, Alberto Franko, Ksavero Moleono, M.Angelo Sanĉo, kaj aliaj.
Prezo: 700,- ptoj. (Libro + sendokostoj)

* 1-an INTERNACIAN RENKONTIĜON kaj
8-an ANDALUZIA KONGRESO DE ESPERANTO en Torrox (Málaga) de la 7a ĝis la 14a de oktobro 1990.
Loĝigo kaj tri manĝoj en tre bela Restadejo apud la plaĝo, en 2,3,4,5,6 kaj 7-litaj ĉambroj, ĉiuj kun necesejo kaj duŝejo.
Venu kaj feriuu en Torrox, vilaĝo de la Suna Marbordo, kun, laŭdire, la plej bona klimato el Eŭropo.

Prezo por la tuta semajno: 14.000,- ptoj.

Informoj / Mendoj / Pagoj ĉe:

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
Poŝtkesto 864
E-29080 MALAGA

UNESCO

united nations educational, scientific and cultural organization
organización de las naciones unidas para la educación. la ciencia y la cultura
organisation des nations unies pour l'éducation, la science et la culture

7, place de Fontenoy,
75700 PARIS

téléphone national (1) 568.10.00
international + (33.1) 568.10.00
adresse télégraphique : Unesco Paris
telex : 204461 Paris

Le Directeur général

référence : DG/1.5/01

5 JAN. 1990

Madame,

Je vous remercie de votre lettre du 25 novembre 1989, par laquelle vous m'avez aimablement invité à présider le 50e Congrès espagnol d'espéranto, qui aura lieu du 11 au 16 juillet 1990 à Sant Cugat del Vallès.

A mon grand regret, je ne pourrai pas prendre part à cet important événement, en raison d'engagements pris antérieurement. Toutefois, je suis prêt, si vous en exprimez le souhait, à adresser au Congrès un message de l'Unesco.

Avec tous mes voeux de succès pour votre Congrès, je vous prie d'agréer, Madame, l'assurance de ma considération distinguée.

Federico Mayor

Mme Trinitat Garcia
Comissio Organitzadora Local
50a Hispana Kongreso de Esperanto
Apartat 336
08190 Sant Cugat del Vallès (Katalunio)
Espagne

# RIDETU IOMETE



## MISKOMPRENO

Knabo eniras florvendejon kaj demandas :
Ĉu vi povas diri al mi la nomon de tiu floro kiu staras sur la montro - fenestro ?
Ho ! Jes, ĝi apartenas al la familio de la rozacoj.
Kaj ĉu vi rezervos ĝin por ili ĝis ili revenos post la libertempo ?.

## TELEFON - KONVERSACIO

Ĉu estas sinjoro Petro ? Infana voĉo respondas :
Ne, la patro ne estas.
Sro. Ĉu via patrino estas hejme?
K. Ne, padrino estad en la kinejo kun amikino; nur estas hejme mia fratino kaj mi.
Sro Ĉu fratino povas manpreni la telefonon?
K. Jes, Sinjoro, bonvolu atendi momenton.
Post kelkaj minutoj revenas al telefono kaj diras:
Mia fratino ne povas paroli kun vi, Sinjoro, car mi ne povis depreni ŝin el la lulilo....

## GRAVA - ERARO

De nun neniam plu mi trinkos, diris al sia amiko Johano.
Kial demandas la amiko?
Ĉar lastan lundon mi trodrinkis kaj pagis mian ŝuldon al la tajloro.

## DRINKEMULO

D. Kial vi drinkas tion multe?. Ĉu vi ne komprenas ke se vi ne drinkus vi jam eĉ povus esti estro?
R. Jes, sed kiam mi estas ebria mi sentas ke mi mem estas la direktoro.

## MISNTERPRETO

Muŝo en ĉi supo, kriegis la kliento al la kelnero...
Tuj mi ĝin kunportos, Sinjoro, respondis la Kelnero, serene kaj kun digno.

## SENKAPABLECO

Maljunulino María senutile klopodas maĉi bifstekon.
Post kelkaj minutoj, tre kolere elbusiĝas la dentaron kaj metante ĝin apud la telero, ek krias: Nu, vi ambau solvu la aferon!

## KONSCIA KNABO

Karlo, sepjara kaj tre vigla, demandas al sia instruistino: Sinjorino bonvolu diri al mi kion mi bone ellernis hodiaŭ, ĉar mia patro ĉiu tage demandas al mi pri tio.

## MEMKONVINKIĜO

Frenezulo prenas el sia poŝo alumet-skatolon kaj ekfrotadas alumenton, sed sensukcese.
Poste provas alian, sed ankaŭ ne ekardis.
Finfine la tria akfairis.
Ha, Ha, tiu ĉi bone funkcias! - ĝoj krias.
Jam mi povas ĝin gardi.
Li stingas l´alumenton, metas ĝin en skatolon kaj tiun ĉi enpoŝigas.

TRINI

# AMIKAREJO

Karaj geamikoj : Jam pasis kelkaj monatoj ke ni kreis la lokan AMIKAREJON en Valldoreix, estus interesa ke oni informu kaj disvastigu la novaĵon, al la Esperantistoj, kaj al ĉiuj personoj kiuj sentas la neceson paroli kun aliaj, pri la gravaj homaj problemoj, kaj interŝanĝi ideojn kaj teknikojn por plifeliĉigi la Homon!

Vi povos pasigi feliĉan tagon en ĉiu arbaro konversante amikece kaj pace.

Nuntempe urĝas pli ol iam antaŭe la alprosimiĝo de unuj personoj kun la aliaj.

Ju pli da ejoj por kunveni kaj konversacii des pli bone.


J.Deltell. (la kuiristo)















# LA KURSOJ

Mi ne scias, ĉu en la altaj instancoj de la Esperanto - Movado oni metas la sufiĉan intereson pri io, kio estas tiom grava kiom la kursoj de Esperanto. Mi jam legis pri kelkaj strategioj, por la vastigo de Esperanto, sed en tiuj strategioj apenaŭ oni dediĉas atenton al la kursoj.Ĉiam la kleraj kapoj de nia movado sin adresas aŭ intencas tion fari al la oficialaj instancoj kaj al intelektularo. Oni analizas ĉion, inkluzive de politika vidpunkto, sed en tiu analizado preskaŭ ĉiam restas for, la kursoj, kaj la kursoj, karaj geamikoj, estas la fundamenta ŝtono de nia movado, de nia ekzistado, de nia estonteco. Sen la kursoj estas nenia strategio.

Unu el la plej penigaj kaj laborigaj taskoj estas la gvido de kursoj. Iri ĉiutage, aŭ tri aŭ kvar fojojn semajne al la kursejo, post forlaso de la ĉiutaga laboro, estas eksterordinara, meritplena dediĉo de tiuj samideanoj. Kaj la laboro ne estas facila. Klarigi la gramatikon ne estas la plejmalfacila ero de ĉiu kursgvidanto. La vera laboro de instruisto estas paroligi la lernanton. Ho ve!, kiom oni devas cerbumi por ke la lernanto kuraĝu balbuti iujn vortojn, laŭ kontentiga fonetiko, kaj kion diri pri la konstruado de la frazoj. Tiam estas kiam la instruisto devas adopti specialajn strategiojn, ĉar ofte okazas, ke oni devas uzi malsaman metodon, en sama kurso. La instruisto devas analizi kaj psikologie bone kompreni ĉiun lernanton, poste oni devas apliki specialan instruon al ĉiu. Almenaŭ en tiuj kursoj malfermitaj al publiko ĝenerala, kiel okazas preskaŭ ĉiam en ĉiu urbo, la diverseco de lernantoj estas evidenta. Mi memoras, ke en kurso gvidata de mi venis iuj instruistinoj kaj aliaj personoj, kiuj preskaŭ estis analfabetoj, kio estigis gravan kontraston, ĉu ne ?. Al tiu kontrasto oni devas aldoni, ke mi troviĝis meze de tiuj du kulturaj ŝtupoj. Fakte mi ne regis la hispanan lingvon, kiel tiuj instruistoj, sed mi jam estis supera al tiuj aliaj lernantoj. La laboro ne estis facila.

Dediĉi tempon, monon kaj ĉion necesan por la sukceso de la kursoj estas la plej bona investo, la kampo estas kaj aspektas pli bela. Oni ne povas neglekti la instruadon. Estas multaj kaj diversaj premioj en la Esperanto - Movado, sed mi ankoraŭ legis nenion pri premio rilatanta al la kursoj. La kursoj estas nia unika fonto, ni klopodu ke ĝi ne ĉesu elspruci.... esperantistojn.

Sabadell 2-2-1990
Luis Serrano Pérez

# ESPERANTO

Esperantismo estas Filologia Movado kaj Filozofia Movado, Filozifia Movado kaj filologia Movado, tio esta, Esperantismo estas kultura Movado, tio estas, Esperantismo estas Socia Movado, tio estas, Esperantismo estas neŭtrala Movado, tio estas, Esperantismo estas neŭtrala Movado, tio estas, Esperantismo estas la vera Revolucia - Movado, tio estas,Esperantismo estas la Homara Movado mem transe de la kapitalismo kaj transe de la Sovetiismo, kiuj ambaŭ certe jam estas arkaikaj situacioj de la Homaro.

Esperantismo, aŭ la vera Revolucia Movado, aŭ la Homara Movado mem aŭ Homarismo, estas do la nova Historio, situacio de la Homaro, kiu anstataŭas la arkaikajn situaciojn de la Homaro, kapitalismo kaj Sovetiismo, Sovetiismo kaj Kapitalismo.

Sed....Esperantismo aŭ Esperanto tute ne estas ŝtato (nek kastilia ŝtato, nek hispana ŝtato, kaj nek Kataluna ŝtato!, nek ia ajn ŝtato, ekzemple, Franca ŝtato).

Esperantismo aŭ Esperantio estas certe " Supraestado " , aŭ komunismo, aŭ Sistemo de personoj, kiel dirus la germana ideista filozofo Fichte, aŭ pli bone dirite, Movada sistemo de personoj.

Entute Esperantio estas la " Supraestado ", aŭ la komunumo, aŭ la Movada sistemo de Personoj, aŭ la absoluta Scio.

Aliflanke, Esperantismo aŭ Esperantio estas certe la platona civito, tio estas, la filologia kaj filozofia Civito, la filozofia kaj filologia Civito (ne nur la filozofia Civito, kiel pensis Platono mem).

Esperanta Movado, aŭ Esperantismo, au Esperantio, estas do...

¡ la Vivo mem ! ¡ la Vivado mem ! .

Jozefo M-ro. Gomá. 7-6-90

# LA ESPERO. L'himme de l'Esperanto

En la mondon venis nova sento,
tra la mondo iras forta voko;
per flugiloj de facila vento
nun de loko FLUGU ĝi al loko.
Ne al glavo sangon soifanta
ĝi la homan tiras familion;
al la mond' eterne militanta
ĝi promesas sanktan harmonion.

Sub la sankta signo de l'espero
kolektiĝas pacaj batalantoj,
kaj rapide kreskas la afero
per laboro de la esperantoj.
Forte staras muroj de miljaroj
inter la popoloj dividitaj,
sed dissaltos la obstinaj baroj
per la sankta amo disbatitaj.

Sur neùtrala lingva fundamento
komprenante unu la alian,
la popoloj faros en konsento
unu grandan rondon familian.
Nia diligenta kolegaro
en laboro paca ne laciĝos,
ĝis la bela sonĝo de l'homaro
por eterna ben' efektiviĝos.

L.L. Zamenhof

Depósito Legal: B. 29059 - 87